# TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO SEPTEMBRO 2006 / JARKOLEKTO 25



*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*



*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*


*"Pluraj kuracistoj jam rezignis pri mi!"*

*"Sed kial? Ĉu ili trovas vian malsanon nekuracebla?"*

*"Ne, tute ne. Sed nur ĉar mi neniam pagas al ili!"*

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: "Lingvaj Resondoj".**



**Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

*"Rigardu!" diris la kaldronisto, "Kiom grandaj tiuj brasikoj estas!"*

*"Ne estas mirinde!" respondis la ĝardenisto, "iam mi kreskigis brasikon tiom grandan kiom domo!"*

*"Jes", respondis la kaldronisto, "ĉio eblas, "iam mi faris kaldronon tiom grandan kiom preĝejo!"*

*Ekridegis la ĝardenisto. "Kia fanfarulo vi estas, vi mensogas ne ruĝiĝante! Iomete mensogu, sed konsciu pri via limo. Nu, tamen, por kio oni bezonas tiom grandan kaldronon?"*

*"Por kuiri vian grandan brasikon!" respondis la kaldronisto.*

**Merkredon la 6an de septembro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 20an de septembro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Dimanĉon la 1an de oktobro Eileen Jones aranĝos por ni ĉiuj ekskurson al Haveno Viktoro.**

**Merkredon la 4an de oktobro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian-kaj mandolinmuziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A. 5012, telefono 8268 4021.**

**Merkredon la 18an de oktobro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.**

**La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazos en 2007 en belega Jokohamo, Japanujo.**

*Iam rustiĝinta fosilo renkontis brilan hakilon kaj ĝin demandis: "Kial via vizaĝo ĉiam brilas? Ankaŭ mi estas farita el fero, sed bedaŭrinde mia vizaĝo ne brilas. Kial mi ne estas glata, pura kaj brilanta? Kio estas la diferenco inter ni?"*

*"Ĉiutage mi laboras en la arbaro hakante lignon", respondis la hakilo. "Laŭ mi la diferenco devenas de mia senĉesa laboro, kara amiko!"*

## MondEtur Esperanto

**Tri fervoraj esperantistoj laboregas en Tajlando disvastigante nian lingvon al la tuta mondo. Ili oferas flegadon al malsanuloj kaj maljunuloj kiel ankaŭ al geamikoj de Esperanto. Ili importas kaj eksportas multajn malsamajn varojn al kaj el Tajlando kaj organizas sportajn kaj kulturajn eventojn en la lando de la ĉiame ridetantaj homoj. Krom tio ili organizas kursojn de tajaj masaĝo kaj boksado.**

**Por pliaj informoj en Esperanto, angla, germana, franca, kroata aŭ serba bonestu skribi**

al info@MondEtur.net kaj vi ricevos tujan respondon.

*La reĝo Frederiko la Granda kutimis doni tri demandojn al ĉiu nova soldato veninta por servi en lia gvardio. Tiuj tri demandoj estis: "Kiom da jaroj vi havas"?*

*"Kiom da tempo vi jam deĵoras en mia servo?"*

*"Ĉu vi akurate ricevas viajn soldatsalajron kaj uniformon?"*

*Iam juna franco, ne kapabla paroli germane, dungiĝis pro sia gracia statuo. La kapitano preparis lin por la tri demandoj en la kutime sekva ordo.*

*La reĝo rigardis la novan soldaton. Tiam li ekdemandis lin, sed, ho ve, li komencis per la dua demando: "Kiom da jaroj vi estas en mia servo?"*

*La soldato, kredante, ke tio estas la unua demando, respondis: "Dudek du jarojn, via reĝa moŝto!"*

*"Ĉu dudek du jarojn? Kiom da jaroj vi havas?"*

*"Unu jaron, via reĝa moŝto!"*

*Respondis la reĝo: "Certe unu el ni estas freneza!"*

*"Jes, ambaŭ, via reĝa moŝto! Respondis la soldato.*

## Sandor Horvath

### Intervjuita de Katja Steele



Sandor naskiĝis la 9an de septembro 1952 en Budapeŝto, Hungarujo. Lia patrino, aktorino, estis tiam nur 18jara, kaj unu jaron poste ŝi foriris de la edzo kaj fileto. Sufiĉe grandan rolon en la vivo de Sandor havis lia patra avino, de kiu li jam junaĝe aŭdis pri Esperanto, kaj de kiu li ricevis sian unuan fotilon. La avino kaj la avo pro politikaj kialoj dum multaj jaroj vivis en Sovetunio, la patro de Sandor eĉ naskiĝis tie, kaj mortis en junio ĉijare. Post la dua mondmilito ili revenis al Hungarujo, kie la avo jam du jarojn estis ministro pri eksterlandaj aferoj.

1956 en Hungarujo – gravaj politikaj eventoj. Timante persekutadon kaj vivon mallibera multaj miloj da homoj fuĝis el la lando. Unu el ili estis ankaŭ la patro de Sandor, kiu transiris la landlimon inter sia hejmlando kaj Aŭstrujo portante sian filon en terpomsako.

Baldaŭ Sandor troviĝis en monaĥinejo kaj post du tie pasigitaj semajnoj li respondis la demandojn de sia vizitanta patro jam germane. La germana iĝis lia plej grava lingvo, sed malgraŭ la vivo en Aŭstrujo li ricevis la tiean civitanecon nur en 1969. Li ankoraŭ kaj daŭre havas ĝin!

Dum ok lernejaj jaroj li loĝis en internulejo, poste sekvis ok monatoj en la deviga militservo. "Oni poste povas ridi pri ĝi, sed tiam ni sentis nin malagrable" – diras Sandor pri ĝi.



En 1973 li en Graz komencis inĝenieran kurson, sed post duona jaro forlasis ĝin. Li forvojaĝis al Vieno kaj ekstudis, en la Pedagogia fakultato de Universitato Vieno, matematikon kaj la rusan (1973-79). En tiu tempo li konatiĝis kun maoismo kaj iĝis ĝia adepto (1975-81). Li diskutis pri Ĉinujo, disdonadis propagandajn flugfoliojn, vendis la ĵurnalon de la partio kaj submetiĝis al ĝia forta disciplino.



Dum tiu periodo li ekkonis Doris, naskiĝintan en Aŭstralio, sed vivantan en Aŭstrujo. Post sep jaroj da geedza vivo ili decidis translokiĝi por unu jaro al ŝia hejmlando, por ke ŝi povu reviziti la lokojn de sia infanaĝo, sed post kelkaj tieaj monatoj ili definitive disiĝis.



Sandor elektis resti en Aŭstralio. En dumonata kurso li lernis la anglan kaj en unujara kurso en Adelajdo atingis diplomon pri edukado (Diploma in Education). Sekvis kvin jaroj, dum kiuj li instruis matematikon kaj la germanan al mezlernejanoj en Adelajdo kaj unu jaron en Kanbero. Post kiam li diplomitiĝis ankaŭ pri la angla (du jarojn duontempe), li ekinstruis la

lingvon en UNISA (Universitato de Sudaŭstralio – samloke kie li mem studis). De tiam (1991) li restas en la universitato, sed de 1997 sub la ŝildo de CELUSA (Centre for English at the UNISA).



Ĉar lia laboro en la universitato ĉiam estis duontempa, de 1991 li laboras ankaŭ en la lernejo por aborigenoj – Tauondi. Li instruis tie matematikon, poste la anglan, iom da komputilado, faris tie la lernejan ĵurnalon, helpis en aliaj kursoj.

En lia privata vivo estis grava la nelonga rilato kun Chris, kies rezulto estas la nun 21jara filino Petra, loĝanta en Brisbano. Krom ŝi la grava virino por Sandor iĝis lia vivkunulino Helen Palmer. Ŝi eniris lian vivon en 1986, kiam ŝi ekloĝis en la domo, kie loĝas Sandor. Temas pri domo, en kiu dum la lastaj 20 jaroj vivas komunume pli ol 60 diversaj homoj, kiujn ligas ilia naturamikeco, vegetaranismo, kontraŭaŭtomobilismo, preteco vivi kiel familio kaj en la lastaj jaroj, danke al Sandor, ankaŭ Esperanto.

Eĉ se li posedas aŭtoveturigpermesilon, Sandor neniam havis propran aŭtomobilon, li multe biciklas. Siatempe li partoprenis kampanjon kontraŭ instalo de uranminejo en Aŭstralio, la polico tri fojojn malliberigis lin.

Esperanto. Eĉ se la unuaj informoj venis ankoraŭ de la avino, al sia unua kurso de la lingvo li iris nur en 1986 kune kun sia amikino, kiu ankaŭ interesiĝis pri la ideo. Pasis pliaj jaroj, poste en 1995 plia lingvolernado en somerkursaro en 1992 kaj 1994. La veran trarompon signifis la alproksimiĝo de la UK, okazigota en Adelajdo. Ĝi donis al Sandor motivon por serioza lernado kaj poste por helpado al la organizantoj de la evento. Li partoprenis la universalajn kongresojn ankaŭ en Berlino (1999), Telavivo (2000), samjare SAT-kongreson en Moskvo, Zagrebo (2001 kun Helen, SAT-kongreson en Nagykanizsa, Hungarujo), Pekino (2004) kaj laste en Vilno (2005). Sed li lernis, ke ofte la malpli grandaj aranĝoj estas pli ĉarmaj ol la grandaj, kaj li do visitis ankaŭ ekz. la Esperanto-kurson en Pluezec, Francujo, turismis tri semajnojn helpe de esperantistoj en Koreujo (2002), partoprenis multajn aŭstraliajn somerkursarojn (estis ĉeforganizanto de tiu en Adelajdo en 2005).

Sen oficiala nomumo li de kvar jaroj gvidas la membrojn de *Esperanto en Sudaŭstralio* kaj de 2004 laboras kiel vicprezidanto ankaŭ en la estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio). Li membras ankaŭ en SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj UEA (Universala Esperanto-Asocio).

Sandor esperantistigis ne nur Helen, sed ankaŭ ŝian patrinon Pat, la samdomajn amikojn Annie kaj Ashley, plurajn el siaj studentoj en la universitato kaj laste li faris progreson eĉ ĉe sia filino. Al siaj samklubanoj li donas sian persistan laboremon kaj zorgeman amikecon. Oni apenaŭ rimarkas, ke li gvidas, sed jes ja, kiam li mankas. Honesta, sincera homo, gaja kompaniano.

*Tri maristoj, diverslandanoj, disputis pri tio, kiu nacio havas la plej grandajn ŝipojn. La unua maristo diris:*

*"Ĉe ni la ŝipoj estas tiom grandaj, ke la ŝipestro devas veturi per motorbiciklo sur la ferdeko, por disdoni siajn ordonojn.*

*Diris la dua: "Tio estas nenio. Ĉe ni la hejtisto transportas per ŝarĝaŭtomobilo la karbon en la fornojn.*

*Aldonis la tria: "Ankaŭ tio estas nenio. Ĉe ni la ŝipoj estas tiom grandaj, ke la kuiristo veturas per submarŝipo en la kuirpoto nur por vidi, ĉu la terpomoj estas jam pretaj por esti manĝataj!"*

## Rondo Kato



Dum la ĵus pasinta Universala Kongreso estis anoncite en la Kongresa Kuriero kiel ankaŭ dum la Solena Fermo ke Rondo Kato estas akceptita kiel kunlaboranta asocio de UEA. Ĉiu, kiu sin interesas pri katoj kaj Esperanto, bonestu aniĝi al Rondo Kato!

*"Kio estas gratulo?*

*"Homo, kiu gratas!"*

## La Rezolucio

La 91a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco, Italujo, kun 2206 partoprenantoj el 62 landoj,

konstatinte,

- ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005 2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo, kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla,

- ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio,
- ke la nuna superego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion ka la rajton je komunikado,
- ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon respondece kaj solidare.

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj, kiuj - sur diversaj niveloj - strebas igi antaŭen praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

## ILEI-Konferenco en Afriko, Kial?

En la ĵus finita konferenco de ILEI, ties Komitato aprobis la klopodojn organizi konferencon en Portonovo, Benino, Afriko en 2008.

Povas esti neniu dubo pri tio, ke la Esperanto-agado en Afriko bezonas sian ILEI-dimension, ĉar estas en Afriko multaj, kiuj deziregas lerni kaj nur malmultaj Esperanto-instruistoj.

La Esperanto-instruistoj afrikaj deziras pli firme komunikiĝi kun kolegoj el la tuta mondo por spertiĝi pri ILEI kaj lerni el ĝia historio; perfektigi siajn lingvokapablojn kaj spertiĝi pri didaktiko; plikonatiĝi kun instrumaterialoj, instruhelpiloj kaj rilataj metodoj por Esperanto-instruado.

Afrika Esperantujo havas multon por oferti al la tutmonda Esperanto-movado, sed vojaĝoj al Esperanto-aranĝoj en aliaj mondpartoj estas tro multekostaj por afrikanoj; fakte nur malmultaj vojaĝoj kaj vizitoj de amikoj de Afriko ne sufiĉas.

ILEI-konferenco en Afriko estos evento tre grava kaj por la Esperanto-movado kaj por la historio de ILEI kaj por la Esperanto-movado en Afriko.

Prenu parton en la konferenco por kuraĝigi la samideanojn en Afriko kaj omaĝi iliajn klopodojn por disvastigado de Esperanto en la tuta mondo.

ILEI kaj la Afrika Komisiono de UEA alfrontos multajn elspezojn por instrui Esperanton al afrikanoj dezirantaj iĝi instruistoj de Esperanto kaj entute por partoprenigi afrikanojn en la konferenco. Financa subteno estas tre bonvena ĉe la konto de ILEI ĉe UEA la Afrika Fondaĵo de UEA kun la indiko "Benino, ilek-a, kun la indiko "por Afriko", aŭ ĝenerale al 2008".

*Renato Corsetti*

*"Kiu besto havas apartan lunon?"*

*"La kato, ĉar ĝi havas katalunon".*

*Ĉiu ŝerco en tiu ĉi numero aperas danke al Andries Lamers, Antverpeno, Belgujo!*